nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2022

## DENOVE ĈEESTA KURSO DE ESPERANTO EN MADRIDO

Finfine, post granda paŭzo dum la lastaj jaroj, en oktobro komenciĝas ĉeesta kurso de Esperanto en Madrido, por komencantoj.

La kurso okazos ĉiusabate matene, inter la 10,00 kaj 12,00, ekde la 8a de oktobro, ĝis la dua semajno de decembro. La loko estos la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo (MEL), strato Rodríguez San Pedro, 13, 3a etaĝo, 7a oficejo. La instruisto estos Andy Hernández, kaj la metodo estos la Zagreba Metodo. La kurso estas senpaga.

Se vi interesiĝas, skribu baldaŭ al la retadreso de madrid@esperanto.es.

## REVENAS ANKAŬ LA GRUPAJ EKSKURSOJ

Ankaŭ revenas la organizado de ekskursoj kaj ĝeneralaj kulturaj eventoj de MEL.

Ni proponas al vi gvidatan viziton en oktobro al interesa kaj tre nekonata muzeo: la **Muzeo pri Arto en Vitro de Alkorkono** (MAVA). Ĝi estas unika en Hispanio, ĉar ĝi eksponas pecojn kreitajn per specialaj teknikoj, kiu donas apartan aspekton al la artaĵoj. Ne temas specife pri kreado de vitro (kvankam la muzeo enhavas spacon ankaŭ por priskribi la prilaboron de la vitro), nek pri ekspozicio de konvenciaj vitraĵoj, sed pri tute aparta tekniko (vi povas vidi iom en la apuda foto)





La muzeo situas en la kasteloj de San José de Valderas, en Alcorcón. Ankaŭ la konstruaĵo mem estas interesa kaj speciala. Temas pri modernaj kasteloj, konstruitaj de kaprica aristokrato en historieca stilo komence de la 20a jarcento, kiuj spertis multajn uzojn, kaj estis restaŭritaj de la urbestraro en la 80aj jaroj de la pasinta jarcento por sia uzo kiel kultura centro. Apud ili troviĝas alia granda kultura projekto, nomata CREAA, de tre grandaj dimensioj, kies konstruado estis haltigita pro la lasta ekonomia krizo.

La vizito okazos la **6an de oktobro**, vespere, ekde la 18,00 horo. Ni rendevuos inter la 17,00 kaj 17,30, ĉe la elirejo de la metrostacio Joaquín Vilumbrales (apud bierejo Gambrinus), kaj poste sub la akompano de Toño del Barrio ni aliros la kastelojn. Eĉ se ekster la ĉefurbo mem, la alveno estas tre facila kaj senpena: la metrostacio estas la unua post Cuatro Vientos en la lineo 10 (memoru ke ĝi troviĝas en zono B1, do vi devos aĉeti "kombinitan bileton" se vi venas el Madrido); ankaŭ la aliro per aŭto estas sufiĉe facila, kaj ne estas grandaj problemoj por parki. La muzeo troviĝas tre proksime al la metrostacio, je 5-minuta promenado.

Vi povas inviti aliajn amikojn, sed, **tre grave**: bv informi nin ĉe niavocho@gmail.com, por konfirmi ke ni atingas la minimuman nombron postulatan de la respondeculoj por gvidata vizito.

## PLUAJ KURSOJ KAJ EKZAMENOJ

Memoru ke plu eblas enskribiĝi en la nova akademia kurso de Esperanto en la Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED). La periodo de enskribiĝo finiĝas la 21an de oktobro, kaj la kurso malfermiĝos la 25an de tiu monato. Oni povas koni pliajn detalojn en la retejo http://www.cuid.uned.es.

Juan del Castillo, membro de Madrida Esperanto-Liceo, partoprenos en aktivadoj en la esperanta kastelo Greziljono inter la 17 kaj la 28a de oktobro 2022. Dum sia restado tie li planas gvidi 2 staĝojn: baza E-kurso kaj terapia masaĝo. Krome, li ankaŭ organizos atelieron pri tabloludoj. Greziljono (Grésillon) estas kulturcentro esperantista kun sidejo en granda historia kastelo en la centro de Francio. La ĉeesto de Juan inkludiĝas en granda regula programo, kun multaj aliaj aktivadoj, kiel kursoj diversnivelaj, ankaŭ kun programo por infanoj. Pliajn informojn en la retejo: http://gresillon.org/.

Fine de novembro estas programata tutmonde retaj KER-ekzamenoj nivelo C2 de UEA, dum la semajnfino de la 26a kaj 27a de novembro. Se vi deziras akiri diplomon, vi trovos la bazaj informojn ĉe: https://edukado.net/novajhoj?id=877.

## NOVA PREZIDANTO DE HEJS



En pasinta numero ni informis pri la nova prezidanto de la internacia junulara organizaĵo TEJO, kaj nun estas la vico de renovigo de la hispana: HEJS (Hispana Esperantista Junulara Societo) elektis novan prezidanton, nian samurbanon Manu Guaroa. Gratulon kaj bonŝancon!

## VIZITOS NIN

En oktobro oni atendas la viziton al Madrido de esperantistoj el Meksikio, Brazilo kaj Kanarioj. Bonvolu atenti la normalajn informajn kanalojn, kaze ke oni organizos renkontiĝojn kun iuj el ili.

## SABATA RENDEVUO

La kutima unuasabata rendevuo okazos la 1an de oktobro, denove en la trinkejo O Miño, strato Esperanto,2 (metrohaltejo Alsacia), ekde la 18,30. Aliro kaj babiltemoj estas liberaj. Pliajn detalojn: https://eventaservo.org/e/7ce0b3.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com